

LA ESPERO

Organ för Esperantorörelsen i Sverige,
utgiven av Gefle Esperantoförening.

Klubo Esperantista de Malmö
La Biblioteko

Gefle 1913. Svenska Skolmateriel Aktiebolaget.

N:o 4.
Maj 1913

Redaktör:
R. PEHRSSON

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspris 5 öre pr mm.

Interesa Esperantista vojaĝo tra Svedujo.

Baldaŭ komencos esperantista internacia ekspedicio al nia plej norda provinco en Svedujo, Lappland. Estas tre interesa projekto, kiu nia samideano, la artisto Wilhelm Herbst el Hannover (Germanujo) ĵus komencis realigi. Post longa prepara laborado la ekspedicio nun estos realaĵo. La ekspedicio ekkomencos de Stockholm la 20-an de junio en tiu ĉi jaro. La celo de tiu internacia esperantista vojaĝo al Lappland estas studadi la unikan kaj mirindan naturon de la provinco. Lappland estas ja unu el la plej interesaj provincoj de nia lando. Kun siaj neĝe kovritaj ŝtonegoj kaj ebenajoj la lando eble ŝajnas esti iom sovaĝa. Sed tio nur estas laŭ la eksteraj. Kiam oni iom enpenetras en la landon oni tuj observas la mirindan belecon de la pejzaĝo, kaj oni devas admiri la variecon de la lando. La provinco estas tre riĉa je belaj vidindaĵoj. Dum la severa vintro, kiel dum la somero, la lando havas sian specialan karakteron, sian tute unikan klimaton. Tio donas al la lando apartan ĉarmon kaj ravigas la vizitantojn. Cetere nia provinco Lappland estas precipe studinda pro la strangaj moroj de la logantoj de la provinco, la lapplandanoj. Estas alia gento ol la ceteraj svedoj. La Lapplandanoj havas siajn diferencajn morojn kaj kutimojn, siajn pensojn pri la vivo k. t. p. Tial la provinco estas tre studinda ankaŭ por la alilandanoj. Ili trovos tie multe da interesajoj, ne nur rilate al la diversspeca kaj riĉa naturo sed ankaŭ rilate al la popolo mem. —

La nun definitive organizita vojaĝo al Lappland por esplori la belajn kaj interesajn de la provinco estas rimarkinda entrepreno. Unue pro tio, ke la ekspedicio estos internacia, en la ĝusta signifo de la vorto. Partopreni povas ĉiu persono, el

ĉiuj landoj de la mondo, nur se li parolas Esperanton, Lingvon Internacian. Sen tiu komprenigilo la ekspedicio ne estas realigebla. Per Esperanto la vojaĝo estas organizita kaj la tuta grava entrepreno iros en la signo de Esperanto. Nova pruvo pri la praktikeco kaj utilo de nia lingvo. La partoprenontoj en la ekspedicio kolektiĝos en Stockholm kaj la 20-an de junio ili forlasos la ĉefurbon por vojaĝi al Haparanda, kie ili renkontos la partoprenontajn esperantistojn de Norvegujo, Finnlando kaj Rusujo. Poste oni komencos la-esploran vojaĝon, restante kelkajn monatojn en Lappland, por fine daŭrigi ĝin al Nordkap. Post vizito de Nordkap oni returnos al Lappland, kies plej rimarkindajn lokojn oni traveturos kaj haltos ĉe ia granda foiro de la Lapplandanoj, por tie pasigi kelke da tempo. Kiam la ekspedicio finis la viziton en Lappland, oni intencas vojaĝi tra Svedujo por fine alveni al Stockholm, kie la diverslandaj membroj de la ekspedicio adiaŭos unu la alian kaj iom post iom vojaĝos hejmen. Kiel ni vidas, la entrepreno estas, laŭ la nun definitive aprobata plano, tre vasta kaj interesplena.

Mi renkontis la gvidonton de la supre preparolita ekspedicio, la artiston Wilhelm Herbst, dum la prepara laborado en Stockholm. Kvankam li estis tre okupata pri la ekspedicia aranĝado mi tamen havis tempon paroli kun li pri kelke da aferoj, kiuj koncernas la ekspedicion. Mi demandis lin ankaŭ interalie, kiamaniere li estis ricevinta la impulson al la grandioza entrepreno. Li respondis, ke dum la Olimpa Ludado kelke da diverslandaj esperantistoj preparolis tian vojaĝon.

Oni ankaŭ decidis organizi esperantistan ekspedicion siatempe al la norda parto de Svedujo. Precipe dank al la Esperantista Komitato dum la V Olimpiado, oni ankaŭ sukcesis kolekti la alvenintajn diverslandajn esperantistojn kaj fari la

preparan laboron. De tiu tempo ĝis nun estas multe da laboro farita, kaj ke la ekspedicio nun realiĝis estas certe ankaŭ dank' al la sindona organiza laboro de s-ro Herbst.

* * *

La Esperantista Komitato dum la V Olimpiado meritas ankaŭ grandan dankon. Sen tiu komitato la ekspedicio al Lappland verŝajne ne estus nun fakto. Ne nur la esperantistoj povis taksii la valoran laboron de tiu komitato sed ankaŭ aliaj, ĉar la Esperantista Komitato helpis multajn fremdulojn dum la lingvokonfuzaj tagoj de la Olimpaj Ludoj.

Estas ankaŭ por ĉiu esperantisto ĝojega fakto ke la Organiza Komitato de la V Olimpiado en Stockholm per sia ĝenerala sekretario, s-ro Kristian Hellström, transdonis al la sekretario de la Esperantista Komitato s-ro Teodor Rosengren la oficialan medalon, kiel memoron de la Olimpiado. Specialan dankon la esperantistoj ankaŭ ĉiam ŝuldas al la ĝenerala sekretario s-ro Hellström, kiu tiel simpatie rilatis kun la Esperantista Komitato, donante al ĝi la necesajn komunikajojn k. t. p. La brila epoko por Esperanto en la ĉefurbo nun estas frukto de la sukceso de Esperanto dum da V Olimpiado. Teka.



»Kemien, som har hela världen till verksamhetsfält, måste hava ett internationellt språk. Om man tänker på det arbete, som i våra dagar utföres för denna vetenskap i Ryssland och Japan och det som i en framtid kommer att utföras, när kinesernas livliga intelligens inriktats på denna forskningsgren, inser man nödvändigheten av att använda Esperanto för att meddela sig med dessa folk, om man vill undvika att studera deras invecklade språk, särskilt det kinesiska med dess omkring 40,000 tecken för lika många begrepp.»

(La Movado.) William Ramsey.

Esperantisk turistresa till Lappland.

En mindre vanlig turist- och forskningsresa, som på samma gång utgör ett utmärkt vittnesbörd om det internationella hjälpspråkets praktiska nytta, kommer inom den närmaste tiden att gå av stapeln här i Sverige. Den 20 juni startar nämligen, med Stockholm som utgångspunkt, ett antal forskningslystna unga esperantister en internationell expedition till Lappland och Nordkap. Idén till denna expedition leder sitt ursprung tillbaka ända till 1912 års Olympiska spel.

Bland de talrika besökarna från världens alla kanter, som då gästade Stockholm, fanns även åtskilliga esperantister. Hos dessa väcktes då tanken på att en gång förnya besöket men att då icke nöja sig med att bese huvudstaden utan utsträcka färden till landets nordligaste trakter. Äran av att ha satt denna plan i verket tillkommer i första hand en tysk esperantist, konstnären Wilhelm Herbst i Hannover, som alltsedan V Olympiaden ihärdigt och oförtrutet arbetat härpå. Herr Herbst befinner sig nu sedan någon tid tillbaka i Stockholm, där han ägnat sig åt det mera omfattande förberedande arbete, som nödvändigtvis föregår en dylik expedition. Det är naturligtvis huvudsakligen bland sina landsmän hr Herbst vunnit deltagare i densamma, samt bland svenska esperantister. Dessutom väntar man emellertid att åtskilliga deltagare skola ansluta sig till expeditionen även från andra länder, då först och främst från Norge, Finland och Ryssland. Att expeditionen blir »esperantisk» i ordets fulla bemärkelse framgår bäst därav, att *endast* esperantister äga att deltaga, då Esperanto nämligen blir det enda »officiella» språket så att säga.

Från Stockholm resa expeditionens medlemmar direkt till Haparanda, där de norska, finska och ryska deltagarna enligt den uppgjorda planen skola stöta till. Här börjar sedan den egentliga studieresan i Lappland, vilken man beräknat kommer att räckta flere månader. Sedan går färden vidare mot nord, tills det slutliga målet för resan, Nordkap, uppnåtts. På återresan går färden ånyo genom Lappland, där alla mera sevärda platser

besökas, varjämte ett längre uppehåll göres vid någon av lapparnas stora marknader. Slutligen går resan vidare söderut till Stockholm, där expeditionens medlemmar skiljas och var och en reser hem till sitt land igen.

Sedermåra är det meningen att i tryck lämna en redogörelse för expeditionens resultat.

Som synes, är det en storartad plan, som vi inom kort få se bli till verklighet. Och detta företag är helt och hållet esperantistiskt. Om Esperanto ej funnits, skulle denna internationella expedition säkerligen aldrig ha ägt rum. Sakta men säkert närmar sig världsspråket sitt praktiska genomförande. Redan länge har man kunnat se tecken härpå, och det första genombrottet ha vi, ehuru på avstånd, kunnat iakttaga i utlandet. Nu äro vi i tillfälle att på närmare håll se ett sådant företag, och det är att hoppas, att många härigenom även i vårt land får ögonen öppna för vad detta innebär.

* * *

I samband härmed torde det vara på sin plats att nämna ett par ord om en sak, som förtjänar att komma till allmänhetens kännedom, nämligen det arbete som under 1912 års Olympiska spel utfördes av den esperantistiska kommitté, som med anledning av spelen tillsattes. Det är ett betydande arbete, som denna kommitté under dessa dagar utförde, och desto mer glädjande är det att se, att man även på ledande håll förstått att uppskatta det, vilket visas därav, att spelens organisationskommitté genom sin generalsekreterare, herr Kristian Hellström, till sekreteraren i den esperantistiska kommittén, herr Teodor Rosengren, överlämnat spelens officiella medalj. Herr Hellström förtjänar även i hög grad esperantisternas tacksamhet för det tillmötesgående varmed han omfattade denna kommitté. Och man torde utan tvivel kunna instämma däri, att den lysande ställning, som Esperanto för närvarande intager i huvudstaden, är en frukt av denna kommittés framgångsrika arbete.



Samideanoj!
Abonu "La Espero"

Kurs

i Esperanto för nybörjare.

Andra lektionen. — Dua leciono.

Översättning av övningsstycke I.

Dag och natt. Far och mor. En vacker blomma. En flitig gosse. En lat hund. Kära vän!

Människor och djur. Långa dagar och korta nätter, varma somrar och kalla vintrar.

Jorden. Solen på himmeln. Flickan är vacker. Den stora rosen är en vacker blomma. Esperanto är ett internationellt språk.

De flitiga gossarna äro goda vänner. Det vita silvret och det röda guldets äro dyra metaller.

Översikt.

Ental.

Knab'o, (en) gosse,
la knab'o, gossen, den gosse,
malgrand'a knab'o, en liten gosse,
la malgrand'a knabo, den lille gossen.

Flertal.

Knab'o'j, gossar,
la knab'o'j, gossarna,
malgrand'a'j knab'o'j, små gossar,
la malgrand'a'j knab'o'j, de små gossarna.

Verb.

Esti, att vara.

Mi estas, jag är,
vi estas, du (ni) är,
li estas, han är,
ŝi estas, hon är,
ĝi estas, den, det är,
ni estas, vi äro,
vi estas, ni äro,
ili estas, de äro.

»Vara» är i svenskan ett regelbundet verb. I Esperanto böjas alla verb regelbundet och få således alltid samma ändelser. Ändelsen *-as* betecknar *närvarande tid* (presens) eller med andra ord, att något *sker*.

Verbets grundform (infinitiv), som igenkännes därpå, att man i svenskan kan sätta ordet »att» före den, betecknas i Esperanto med ändelsen *-i*. Ex. *skrib'i*, (att) skriva, *parol'i*, (att) tala, *labor'i*, (att) arbeta, *ir'i* (att) gå.

Skrib'i, skriva, som även i svenskan är ett regelbundet verb, heter således:

Mi skrib'as, jag skriver,
vi skrib'as, du (ni) skriver,
li skrib'as, han skriver,
ni skrib'as, vi skriva,
vi skrib'as, ni skriva,
ili skrib'as, de skriva.
Gör på samma sätt med *paroli*,
labori, *iri*!

Genom att sätta ordet »ne» (icke)
framför verbet, blir satsen nekande:

Mi ne estas, jag är icke,
vi ne stas, du (ni) är icke, o. s. v.

Frågande form uttryckes genom
ordet »ĉu». I svenskan uttryckes
den vanligen genom att kasta om
ordföljden; i Esperanto måste en
frågesats alltid, såvida den ej inne-
håller något frågande pronomen
(vem, vad, när el. d.), inledas med
»ĉu». Ex.:

Ĉu mi skribas, skriver jag,
ĉu vi skribas, skriver du (ni), o. s. v.

Adverb

Adverbet (omständighetsordet) ut-
gör vanligen en närmare bestämning
till ett verb, och säger, *huru*, *var*
eller *när* något sker. Ex.: (Han
skriver) *dåligt*, (hon sjunger) *vackert*,
(det regnar) *ute*, (de komma) *snart*.

Adverben äro i Esperanto dels
självständiga, dels avledda från
andra ord. Till de självständiga,
vilka icke erhålla någon ändelse,
höra sådana ord som nun (nu),
baldaŭ (snart), jus (nyss), hodiaŭ (i
dag), tre (mycket), pli (mera), plej
(mest). De avledda bildas av ett
stamord genom tillägg av ändelsen
-e. E.: skrib'e (skriftligt), bon'e
(gott, väl), bel'e (vackert), feliĉ'e
(lyckligt).

Ordbildning.

Genom att till ett stamord, som
betecknar en person (eller ett djur),
foga ändelsen, -in bildas ordets
kvinnlige motsvarighet. (Jämför i
svenskan regent—regentinna, här-
skare—härskarinna!). Ex.: vir'o,
man; vir'in'o, kvinna; patr'o, fader;
patr'in'o, moder; amik'o vän;
amik'in'o, vänninna; bov'o, ox;
bov'in'o, ko.

Övningsstycke II.

Översätt till svenska:

La patro estas serioza. Li parolas
serioze. Ĉu vi parolas serioze? La
patrino diras, ke ŝi ne povas veni.
Ĉu vi ne volas veni? Ne, mi estas
tre laca, kaj bezonas ripozi.

Kiu estas en la ĝardeno? — Karlo
estas en ĝi. Ĉu li estas sola? —
Jes, sed nun mi intencas iri al li.
Ĉu ankaŭ vi venas? — Ne, mi ne

povas, mi devas iri al la lernejo.
Kie estas Mario? — Mi ne scias;
ĉu ŝi ne estas en la biblioteko? —
Jes, nun mi memoras, ŝi skribas al
amikino. Sed nun mi devas iri tuj,
la horloĝo sonoras. Adiaŭ!
(Översättning i nästa nummer.)

Ordlista.

Substantiv.

ĝarden'o, trädgård.
Karl'o, Karl.
lerneĵ'o, skola (skolhus).
Mari'o, Maria.
bibliotek'o, bibliotek.
horloĝ'o, klocka.

Adjektiv.

serioz'a, allvarlig.
lac'a, trött.
sol'a, ensam.

Verb.

parol'i, tala.
dir'i, säga.
pov'i, kunna.
ven'i, komma.
vol'i, vilja.
bezon'i, behöva.
ripoz'i, (att) vila.
intenc'i, ämna.
ir'i, gå,
dev'i, böra,
dev'as, bör, måste.
sci'i, veta.
memor'i, minnas, komma ihåg.
skrib'i, skriva.
sonor'i, ringa, slå (om klockan).

Andra ord.

ne, nej, icke, inte, ej.
ke, att.
tre, mycket.
kiu, vem, vilken.
en, i.
jes, ja.
sed, men.
nun, nu.
al, till, åt.
kie, var, varest.
tuj, genast, strax.
adiaŭ, adjö.



*Antalet regelbundet utkommande
Esperantotidningar* uppgick vid 1912
års slut till mer än 150, represen-
terande nästan alla jordens länder.

Bär Esperantostjärnan!

Sveda kroniko.

La vizito de prof-o Pitlik.

En Stockholm. — La solena festo,
aranĝita de »Verda Stelo» en Stock-
holm la 4-an de majo en la Reall-
lernejo, fariĝis sukcesplena. Ĉirkaŭ
500 personoj ĉeestis. La feston
enkondukis la granda horo kaj
orkestro de la Reallernejo. Sub
gvidado de muzikdirektoro A. O.
Assar la elevoj de la lernejo mont-
ris sian talenton. La belaj kantoj
kaj la bonega muziko faris grandan
impreson kaj estis rekompencata per
viva, kora aplaŭdado. Poste la
prezidanto de la grupo, s-ro Ch.
Fredriksson aperis sur la estrado
kaj faris elokventan salutnan parol-
ladon, samtempe prezentante al la
publiko nian honoran gaston, prof-o
Aug. Pitlik de Praha. Antaŭ la
komenco de la parolado de prof-o
Pitlik ni havis la ĝojon aŭskulti
esperantajn muzikaĵojn, talente kaj
delikate ludataj de fraŭlino Ella
Lindahl. La solenan paroladon de
nia festo faris prof-o Aug. Pitlik.
En viva maniero li paroladis pri
Bohemujo kaj Praha, ilustrante sian
paroladon per admirindaj lumbildoj.
La publiko estis tute ravita, kion
plej bone ankaŭ montris la ovacia
aplaŭdado. La parolado de prof-o
Pitlik estis sveden tradukita de nia
sekretario T. Rosengren. Post la
parolado ni ree havis la plezuron
aŭskulti esperantomuzikon de nia
ĉarma membrino Ella Lindahl. Pre-
cipe la Esperantovalso de M. Menil
multe plaĉis al la publiko kaj devis
esti reludata. La bela esperantista
festoj, en kiu la Reallernejo oficiale
partoprenis, finiĝis per marŝo, vigle
ludita de la orkestro de la reall-
ernejo. — Post la parolado la espe-
rantistoj kunvenis en restoracio
»Rosenbad», kie ni pasigis agrablan
vesperon kun kaftrinkado k. t. p.

Teka.

La adiaŭa festo.

Jaŭde la 8-an de majo la »Verd-
stelanoj» kunvenis en nia esperanta
ejo, »Freja», Tunnelgat. 19, por
adiaŭi nian honoran gaston prof.
Pitlik, kiu nun estis forironta Rus-
ujon. En la kunveno partoprenis
ankaŭ italo kaj germano.

S-ro redaktoro Paul Nylén faris
la adiaŭan paroladon, en kiu li dan-
kis prof. Pitlik pro la granda pro-
pagando por nia »kara», kiun li
faris, parolante pri sia lando kaj

popolo. Fine li petis al la profesoro transdoni la svedajn salutojn al la transmaraj samideanoj. Prof. Pitlik respondis, dankante pro ĉio, kion li spertis ĉi-tie kaj elparolis la deziron pri baldaŭa revido.

Vendrede, en la vespero, prof. Pitlik forvojaĝis. Kelkaj esperantistoj estis ĉe la ŝipo por adiaŭi lin, kaj dum »Bore» pli kaj pli malproksimiĝis, ni aŭdis la ĝis-revido'n de la profesoro, staranta sur la plej antaŭa loko de la ŝipo kaj svinganta sian ĉapon. — — —

Nun ni atendas la japanon, kiu laŭ la diro de prof. Pitlik baldaŭ imitos lian ekzemplon.

»Joĉjo.»

En Gefle. — Mardon la 6-an de majo prof. Pitlik paroladis en Gefle, en la ejo de la Laborista Instituto, antaŭ multnombra aŭskultantaro, proksimume 400 personoj. Post kiam la kasisto de nia klubo, s-ro W. Wahlund, prezentis la faman gaston por la publiko, tiu komencis sian paroladon pri Bohemujo kaj ĝia ĉefurbo. Preziantante la riĉan kolekton de lumbildoj, kies ĉarmo kaj beleco superis ĉiun imagon, li montris, kiom da belaj kaj vidindaĵoj posedas lia hejmlando kaj hejmurbo, la »centtura» Praha. La longa, elokventa parolado, lerte kaj precize tradukita de nia konata samideano J. Lundgren el Hedemora, evidente kaptis la tutan intereson de la ĉeestantoj, kiuj post la parolado per brua, daŭra aplaŭdado dankis la parolanton. En mallonga sed impresa parolado s-ro Wahlund fine esprimis al la profesoro la dankon de la klubo esperantista de Gefle.

Pli malfrue en la vespero kelkaj samideanoj kolektiĝis en la Centra Hotelo, kie la vespero dum interparolado kaj babilado baldaŭ pasis. Interalie parolis por la gasto s-roj Helsing kaj Lundgren. Je la propono de prof. Pitlik, oni ankaŭ sendis salutkarton al Dro Zamenhof.

La granda internacia kongreso de la teozofoj okazos en Stockholm la 15—20 de junio 1913. Multe da esperantistoj ĉeestos la kongreson. Inter aliaj partoprenontaj teozofoj ni rimarkas ankaŭ nian konatan kaj fervoran samideaninon F-ino Margarethe Noll el Kopenhago. Por sole ne kaj oficiale akcepte la diverslandajn samideanojn la klubo »Verda Stelo» preparas belan esperantistan feston en la *Reĝa Muzika Akademio.*

Novaj kluboj.

Gotenburgo. — La 27-an de aprilo fondiĝis »Gotenbura Esperanto-klubo (Göteborgs Esperantoklubb), kiel informas nin nia fervora samideano s-ro Carl Ohlsson, delegito de U. E. A. en tiu urbo.

Je la unua kunsido, kiu okazis en la nova Bufedo Karlanders, la klubo elektis la jenan estraron:

Prezidanto: s-ro Jacques Huysmans (holandano, nun loĝanta en Gotenburgo).

Kasisto: s-ro Reinhold Fegraeus. Sekretario: s-ro Carl Ohlsson, del. de U. E. A.; adreso: 2:a Långgatan 32, Göteborg.

La klubo, kiu nun kunvenas ĉiun duan dimanĉon en la supre citita restoracio kaj la aliajn dimanĉojn ĉe s-ro Fegraeus, jam diskutis diversajn proponojn kaj projektojn, kiuj promesas multe por nia lingvo en la sudsveda metropolo. Inter la plej gravaj decidoj de la klubo estas tiu, ke abonado de »La Espero» estos deviga por la membroj. Gratulante la novan klubon kaj ĝiajn iniciatintojn, ni dankas ilin por tiu imitinda decido, kiu certe ankaŭ montros sian efikon por konservi la intereson de la membroj.

Norrköping. — Karaj samideanoj! — Nia Esperanto venkas ĉie. Mi havas la plezuron sciigi, ke mi antaŭ nelonge en la »malhela» Norrköping fondiĝis esperanta klubo. En la klubo estas lernantoj de la kolegioj kaj aliaj lernejoj en Norrköping. La nomo estas »La Esperanta Stelo». La nombro de la membroj estas nun 15 gejunuloj. La klubo fondiĝis la 10-an de majo 1913 kaj la estraro estas:

Prezidanto: s-ro Leander Tell; vica prez.: s-ro Rudolf Isoz; sekretario: s-ro Helge Wallentin kaj vica sekr. kaj kasistino: fr-ino Greta Sundberg.

Mi fondos ankaŭ baldaŭ klubon de laboristoj. Skribajoj estos respondataj de la prezidanto. — Kun esperantista saluto.

Leander Tell, membro de la Brita Esp. Asocio. Prezidanto en »La Esperanto Stelo», Norrköping. Adres: G:a Rådstugugatan 44.

Al tio ĉi ni povas aldoni, ke ankaŭ ĉiuj membroj de »La Esperanta Stelo» abonas je »La Espero». Ni deziras al la klubo plej bonan sukceson kaj gratulas s-ro Tell, kies energia laboro jam havis tiel bonan rezultaton.

Borås. — Pri la movado en tiu urbo nia konata propagandisto s-ro J. A. Blomqvist raportas:

En la kontorist- kaj komercista societo en Borås nia fervora samideano kaj ĉiam senlaca batalanto, la fabrikestro s-ro Otto Roesel, la 22-an de aprilo faris bonegan kaj tre interesan paroladon pri Esperanto, bone klarigante la utilecon de Esperanto por la komerco.

La tre instrua parolado estis atente kaj kun granda intereso aŭskultata kaj la parolanto poste vigle kaj forte aplaŭdata. Ankaŭ en tiu ĉi societo, ni esperas, la intereso por Esperanto povos iom vekigi, kaj la venontan sezonon s-ro Roesel intencas malfermi kurson por membroj.

Ĉiam montrante viglan kaj veran intereson por nia lingvo, s-ro R. ŝparis nek laboron nek tempon por diskonigi Esperanton kaj vekis intereson por ĝi en kiel eble plej vastaj rondoj, kaj kiam estis necese, li ankaŭ finance subtenis nian movadon. Kiel kondukanto de la kursoj en ĉi-tiea grupo, kies prezidanto li ankaŭ estas, li per sia bona kaj vigla instruadmaniero, ĉiam faris bonan, vivigan impreson ĉe la ofte laciĝantaj lernantoj. Por tiu li ankaŭ meritas nian samideanan dankon!



El »Havamal«.

Sensaĝa vir',
inter spertuloj veninta,
preferu resti silenta;
Neniu trovas,
ke nenion li scias,
se li mem malmulte parolas;
Malprudentul'
ne scias tamen,
ĉu li tro multe diras.

Ofte parolas
tre malsaĝajn vortojn
la viro tro parolema;
Rapida lango,
kiun oni ne estras,
ofte kaŭzas malsukceson.



Jorden runt.

Amerika. — I »Holanda Pioniro» läses:

»6,000 skolbarn från 94 skolor i Yamhill County önska medels vykort korrespondera med skolungdom i andra länder (på Esperanto). Adress: Fr-ino Elva Hayden, R. F. D. el. Street n-ro 2, Yamhill County, Oregon, U. S. A.

Amerikanskt!

S-ino Eleonore de Cisneros, en berömd sångerska vid operan i Filadelfia, har låtit översätta några av sina bästa sångstycken till Esperanto i avsikt att använda dessa texter vid sina konserter, emedan hon anser, att Esperanto lämpar sig mycket bättre härför än italienskan.

England. — »The British Esperantist» redogör i sitt sista nummer för ett intressant försök att undervisa Esperanto i »Liddon Memorial School». I kursen deltaga 19 flickor, av vilka de flesta blivit mycket intresserade. Man har observerat, att de efter studiet av Esperanto flitigare läsa franska och engelska grammatiken och bättre förstå att analysera och ordna satserna. I januari satte man in en annons i »The British Esperantist», vari man bad utlänningar brevväxla med flickorna. Tills i mitten av april erhöll man 300 svar på denna annons och flera komma för varje dag, så att flickorna korrespondera med esperantister i snart sagt alla jordens länder.

Finland. — Den 8—9 mars ägde tredje finska Esperantokongressen rum i Helsingfors, under stor avslutning av esperantister från alla delar av landet. Beslut fattades att tillsätta en kommitté att avgiva betyg till blivande lärare i Esperanto, samt en annan kommitté att arbeta för Esperanto bland de blinda. Vidare beslöts gå i författning om utgivande av en fullständigare esp-finsk ordbok samt en finsk-esperantisk parlör, som samtidigt kunde tjäna som en lättfattlig lärobok för självstudium.

Holland. — Den första nederländska Esperanto-kongressen hålles i Haag den 26—28 juli d. å. — Föreningen »Fine ĝi Venkos» i Haag har på den stora sport- och turistutställningen därstädes nästa sommar förhyrt ett mindre område för

anordnande av en särskild Esperantoavdelning. Utställningsstyrelsen har även låtit översätta ett cirkulär ang. utställningen till Esperanto att spridas i utlandet. — I Amsterdam pågå två kurser för polismän.

Kaukasien. — I »Kaŭkaza Esperantista Societo» i Tiflis höll för någon tid sedan s-ro Gavelka, assistent vid Kungl. Akademien i Leipzig, ett föredrag om en resa genom Sverige, Norge, Belgien och Österrike, på vilken han med gott resultat begagnat sig av Esperanto.

Kina. — I Tientsin har öppnats ett hotell med namnet »Hotelo kaj kafejo Esperanto».

Ryssland. — Handelsskolan i Serpuhov har beslutat upptaga Esperanto på sitt program. — I Kiev har föreningen »Verda Stelo», som räknar 500 medlemmar, under år 1912 anordnat 23 kurser, vid vilka 13 lärare givit tillsammans 294 lektioner. — F. ordföranden i föreningen i Kovno, A. M. Nedošivin, har mottagits i audiens av handels- och industriministern, S. I. Timašev, och redogjorde därvid för Esperantos framgångar i handelskretsar, samt överlämnade till honom ett exemplar av Nya Testamentet på Esperanto. — »La Ondo de Esperanto» meddelar även, att Moskva-föreningen haft besök av ingenjör Eskil Håkansson från Stockholm, som kommer att bosätta sig därstädes för framtiden. Hr H. var på sin tid en av våra ivrigaste esperantister i Stockholm och vi önska honom all framgång på sitt nya verksamhetsfält.

Tyskland. — Av siffrorna i Tyska Arbetarnas Esperantoförbunds årsredogörelse framgår, att förbundet, som vid 1912 års början omfattade 38 föreningar med 713 medlemmar, vid slutet av året hade 63 föreningar med tillsammans 1,064 medlemmar, vartill under första månaderna innevarande år kommo ytterligare 7 föreningar med 90 medlemmar. — I årsredogörelsen för de tekniska skolorna i Chemnitz meddelas, att Esperanto även föregående år ingått i undervisningen i en del kurser. Föreståndaren för denna avdelning, dr Wickel, erhöi av sachsiska ministeriet officiellt tillstånd samt penningbidrag att bevisa åttonde världsesperantokongressen i Krakau.

Ungern. — Utgivaren av den ungerska Esperantotidningen »La Verda Standardo» har skänkt 20,000 kr. till befrämjandet av Esperantos utbredning.



Prof. Aug. Pitlik.

Hälsningstal

vid Esperantoföreningen »Verda Stelos» högtidsfest den 4 maj 1913, hållet av föreningen ordförande, herr **Charles Fredriksson.**

Mina damer och herrar!

Stockholms Esperantoförening »Verda Stelo» har i dag den äran att hälsa Eder hjärtligt välkomna till sin högtidssammankomst.

När upphovsmannen till världsspråket Esperanto, doktor Zamenhof, hälsade deltagarna i den första esperantistiska världskongressen i Boulogne-sur-Mer år 1905, vågade han redan uttala den övertygelsen, att den tusenåriga drömmen om ett internationellt hjälpspråk, gemensamt för hela mänskligheten, börjat bli en verklighet.

Det är karaktäristiskt, att doktor Zamenhof vid sina första anonyma försök att vinna anhängare till sin världsomfattande idé kallade sig Doktoro Esperanto — »doktor som hoppas». Man kan icke gärna säga, att esperantisternas förhoppningar varit fåfänga. Hindren och motigheterna för utbredningen av Esperanto ha varit många och svåra, men i betraktande av den genomgripande betydelse, som en fullständig framgång för världsspråksidén innebär, ha de dock sällan förmått

verka nedstämmande. Under de gröna standaren, Esperantos symbol, ha alltid funnits ivriga anhängare, som i medvetande om vikten av sitt värv haft mod och kraft att föra saken framåt. Sedan Esperanto för första gången framträdde inför offentligheten, år 1887, har antalet av dess anhängare varit i ständig tillväxt. Själva grundtanken om världsspråket är helt naturligt av rent ideell natur men dock av en sådan art, att dess odlande ovillkorligen medför vittgående praktiska konsekvenser. Det är icke här plats eller tid för framhävande av de många tillfällen, då Esperanto bestått provet i avseende på de fordringar, som man i rent praktiskt avseende varit berättigad att ställa på ett världsspråk. Vi kunna i stället i dag på vår högtidsfest lämna ett mera talande bevis för sannolikheten av de åsikter, som vi hysa om det internationella hjälpspråket Esperanto. Jag här här det stora nöjet, mina ärade damer och herrar, presentera vår hedersgäst, herr professor Aug. Pitlik från akademien i Prag. Prof. Pitlik är den första europé, som med användande av enbart Esperanto gör en resa genom snart sagt alla världens länder.

Ändamålet med denna resa är att utbreda kännedomen om Böhmen och speciellt staden Prag och dess kulturhistoriska skatter. Under sin resa har prof. Pitlik besökt 9 stater i Europa och därunder hållit 28 föredrag. Om framgången av denna föredragsturné ha vi kunnat läsa i tidningarna, där vi även inhämtat, att åhörarnes antal varje gång varit betydande. Uppslaget till dessa turnéer gjordes föregående år av Mr. Parrish från Kalifornien, som då gjorde en liknande resa och därvid ävenledes på Esperanto höll föredrag om *sitt* hemland och dess möjligheter, på uppdrag av handelskammaren i Los Angeles.

På grund av den stora succés, som dessa resor ha medfört, ha vi snart att vänta flere efterföljare, exempelvis den japanske ingenjören Pakahashi och ungraren Keleti, vilka ävenledes i Esperantos tecken skola resa kring alla jordens länder i den lofvärda avsikten att utbreda kännedomen om sina respektive fosterland och dessas kulturella utveckling. Uttalande den förhoppningen, att den rörelse och de idéer, för vilka vi esperantister arbeta, måtte omfattas med Eder fulla bevägenhet, hälsar jag Eder ännu en gång hjärtligt välkomna.

Om det levande esperantospråket.

Skalder och konstnärer kunna icke längre med fog kritisera oss i förakt för onatur och poesilöshet. Dyligt förakt känna även vi, och en sådan konstnärskritik biträda vi av allt hjärta mot dem som förtjäna det. Med dem må man aldrig förväxla oss!

Ett levande språk förtjänar att läras väl. För personer, som helt simpelt önska använda det för det ena eller andra lilla praktiska syftet, är det måhända tillräckligt att skriva eller tala vårt språk på ett tydligt, om också inte fullt korrekt sätt. Men för personer, som älska vårt språk och fatta den innersta andan däri, får detta icke vara nog. De böra studera det mera grundligt, läsa våra goda författare, nå fram till »kärnan» i vårt språk, finna hemligheten av dess tjusning och stil. Efter dylig läsning och efter en smula improviserad övning, vänja de sig också snart att tänka direkt på Esperanto och betrakta språket inifrån och utan att vidare till detsamma överflytta modersmålet uttryck för tanken. Vårt språk lever utmärkt sitt eget liv; fördenskull är det nästan alltid olämpligt att söka ett träffande uttryck genom dylig överflyttning. Utan tvivel röner Esperanto, liksom övriga språk, påverkan av sina nationella grannar, förnämligast i fråga om sitt materiella och tekniska ordförråd. Men den starkaste påverkan — och den bästa — härflyter beständigt från dess egen anda. Bland våra författare äro de mest uppburna stilisterna ju de, som ha bästa förståelsen härför.

Vi riskera alltid misstag i begrepp eller uttryck, om vi låta vårt modersmål i varje ögonblick påverka oss. Om vi talade något annat konstgjort system, skulle vi ovillkorligen tvingas därtill, ty i dessa system är det ordböckerna som regera. Men just därför har intet dyligt system lyckats, ty ett språk kan icke leva av ordtecken, vilka aldrig ha precis samma betydelse i det ena språket som i det andra.

Om vi vilja känna användningen av vissa ord, såsom t. ex. »professor» och »studento», böra vi söka dem just i *vår litteratur* och icke i användningen av likalydande ord i vårt modersmål. På franska kan

ordet »professeur» ofta blott och bart betyda »lärare i vad som helst». På engelska brukas ordet »student» om en person, vilken som helst, som studerar något, och man kan exempelvis vid en esperantokurs i England ha »students» av vitt skilda åldrar — 8-åringar ända upp till 80-åringar.

Emellertid kan man i åtskilliga länder bli lagligen straffad, om man använder titeln »professor» utan att vara av staten bemyndigad universitetslärare; och för en tysk framkallar ordet »student» genast bilden av en ung man med färgrik mössa, lång pipa i munnen och en biersejdel i handen.

När en esperantist begagnar ordet »profesoro» eller »studento», bör han inte tänka på »student» eller »professor», ty då skulle han ge de esperantiska orden en ofta oriktig innebörd. Han bör veta genom den hittillsvarande esperantiska användningen av dessa ord, att profesoro är en högre lärare eller lärarespecialist, men icke nödvändigt en statens ämbetsman, och en studento ofta nog är något helt olika mot studerande eller lärjunge.

Lika illa är det att skriva »fari konferencon», därför att man på franska säger »faire une conférence». Enligt bruket betyder »konferenco» på esperanto en sorts sammanträde eller möte för uppnående av beslut eller överenskommelse. Att använda ordet i speciell fransk betydelse är nästan lika illa som att t. ex. säga »atendi kunvenon» i stället för »ĉeesti kunvenon», därför att det engelska ordet »attend» betyder bevista.

Det är ej nog, att en rot är i viss mån internationell, för att vi skola kunna använda den i vilken betydelse som helst i vårt språk. Språkbuket har i allmänhet givit dyliga ord en tillräcklig vid, men likväl också en tillräckligt noggrann betydelse, som man får känna till, innan man använder ordet. Vårt språk står inte baserat endast på ett litet torrt fundament av regler och ord utan på hela traditionen från sitt hittillsvarande liv, som — fastän ännu ej långt — redan är högeli- gen intressant och fullt av poesi.

Nu nöjer sig icke världen med förslag; *fakta* är vad den vill. Låt oss då fortfara att bygga upp och ständigt utvidga vår lilla esperantovärld som ett idealiskt och levande mönster för hela världen i framtiden. Vi skola låta den växa vae-

ker och flärdlös, strålände av frihet i arbete, av fredens tjusning och poetisk ungdomlighet.

I denna vår lilla värld har Esperanto redan bragt lycka eller nytta åt människor av skilda slag. I varje av jordens länder finnes redan någon övergiven människa, någon överhopad arbetsmyra, någon stäckars blind eller kanske någon mäktig yrkesutövare, som i Esperantoland funnit en hjälp, en utväg, en glädje, ett ideal. Vad vi ha, må vi låta växa vidare för andra, och må vi tillsammans med vår värderade Zamenhof, som givit oss impulsen, bekänna vår glädje över att denna vår lilla värld med varje dag förökas och blomstrar, tills den inom en avlägsen framtid själv blir all världen.

Tutsveda Esperantotago en Gefle.

6-an—7-an de julio 1913.

En nia lasta numero ni prezentis la provizoran programon de la tago. Bedaŭrinde eniĝis en ĝi grava preseraro, kiu kredeble mistifikis multajn el niaj legantoj. La Esperantotago okazos la 6-an—7-an de julio, ne de aŭgusto, kiel la programo ŝajnis.

Ni nun laboras energie por pretigi ĉion ĝis la kongreso. Kvankam la programo ankoraŭ ne estas tute difinita, ĝi plej kredeble restos sen ia grandaj ŝanĝoj tia, kia ĝi aperis en n-ro 3 de »La Espero».

Antaŭ la kongreso estos aranĝita ekspozicio de ĉiaj esperantaj, kiun ni provos fari kiel eble plej kompleta kaj reprezenta, kaj al kiu estos invitataj la »eminentuloj» de la urbo, la reprezentantoj de la gazetaro k. t. p. Ni ankaŭ preparas malgrandan teatraĵon, ludota dum la »tago».

Laŭ ĉio tiu kongreso estos unu el la plej gravaj ĝis nun okazintaj en Svedujo, kaj ni sincere invitas niajn samideanojn en ĉiuj lokoj de nia lando al multnombra vizito. Ni ankaŭ speciale admonas la klubojn jam nun pripensi la demandon pri sendo de reprezentanto. Ni petas la partoprenontojn ensendi sian aliĝon kiel eble plej baldaŭ, ĉar tio multe plifaciligos nian laboron.

La kongresa kotizo estas fiksita, je 2:— kr. (1:10 Sm). Mendu do tuj la kongresan karton ĉe la kasisto de S. E. F., s-ro J. Helsing, Gefle. Klubo Esp. de Gefle.

Libroj kaj gazetoj.

Vojaĝado en Finnlando. Eldonita de Esperanto-Asocio de Finnlando. Prezo 0:20 Sm.

Tiu libro, 64-paĝa, bela volumo, riĉe ilustrita kun vidaĵoj el ĉiuj pli rimarkindaj lokoj de la »lando de la mil lagoj», indas esti havigata de ĉiu esperantisto, kiu iomete interesiĝas de turismo. En klara, konciza maniero la libro donas al la turistoj, kion li bezonas scii — nek pli, nek malpli. Post mallonga artikolo pri Finnlando kiel la paca angulo de Eŭropo, sekvas priskriboj pri kelkaj urboj, pri la vojoj, kiuj plej plaĉas al la turistoj k. t. p. Bona landkarto kompletigas la libron. Niaj finnaj samideanoj vere meritas nian dankon pro tiu verko, kiu povas servi kiel bona modelo por similaj libroj pri aliaj landoj — ankaŭ nia.

* * *

Samtempe ni citu du aliajn, ne malpli gravajn verkojn de la sama speco, sed de pli malproksima lando.

»*Los Angeles, Kalifornio*» kompletigas al ni la informojn, kiujn donis al ni s-ro Parrish, kiam li siatempe faris sian paroladvojaĝon ĉirkaŭ la tero. Multilustrita, bela broŝuro, interesa de la unua paĝo ĝis la lasta, kaj eldonita de la *Komerca Ĉambro de Los Angeles*.

»*Tacoma, la urbo kun neĝkovrita monto ĉe ĝia pordo*» estas la nomo de vera artverkaĵo, plejparte konsistanta el multo da belaj, koloritaj bildoj de la progresanta urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. La teksto de la libro, kiu estas eldonita de la *Komerca Klubo kaj Komerca Ĉambro de Tacoma*, estas en la angla lingvo, sed mallonga rezumo de ĝi ebligas ĝian komprenadon ankaŭ de esperantistoj.

Pri la valoro de Esperanto la eldonantoj skribas:

»Ni volas tie ĉi diri ke jam antaŭ kelkaj jaroj ni komencis uzi Esperanton por reklamadaĵ celoj kaj la rezultato estis tre bona. Per la internacia lingvo ni atingis la tutan mondon.»

Ĉiu, kiu pripensas foriron al Usono, kaj precipe al Nordokcidenta Usono, povas senpage ricevi la libron, je la adreso: Esperanto, Commercial Club, Tacoma, (Wash.) U. S. A.

Ingen Rökare

bör undvara

LÄKEROL-BRÖST-TABLETTE

hvilken borttar all tobaks-lukt och med sin friska smak verkar upplifvande.

Läroböcker i Esperanto.

Kurs i Esperanto av G. H. Backman, 25 öre.

Lärobok i Esperanto, med Esp.-svensk ordbok av P. Nylén, 1:— kr.

Erhållas hos La Esperos redaktion, 3—23, Gefle.

Ricevitaj gazetoj.

Följande Esperantotidningar ha kommit redaktionen tillhanda:

»*Paris-Esperanto*». Red.: 56, Rue Raynouard, Paris, Frankrike. Prenumerationspris 1: 50 fr. (1:10 kr.)

»*Volga Stelo*». Red.: Sokolovaja 136, Saratov, Ryssland. Prenumerationspris 0: 65 Sm. (1:20 kr.)

»*Kataluna Esperantisto*». Red.: 12, strato Gracia, Sabadell, Spanien.

»*La Movado*». Red.: 61, Bd St-Marcel, Paris, Frankrike. Prenumerationspris 1: 30 Sm. (2:40 kr.)

»*Oriente Azio*». Red.: Sekaigo Ŝoin, Oŭsakimaĉi, Ebaragun, Tokio, Japan. Prenumerationspris 1: 20 Sm. (2:20 kr.)

»*Germana Esperantisto*». Organ för Tyska Esperantoförbundet. Red.: Struvestr. 40, Dresden A. 1, Tyskland. Prenumerationspris 2: 40 Sm. (4:40 kr.)



Leterkesto.

J. L. L., Fränö, kaj Hj. L., Boden. Dankon pro la kompleta listo. Ĉu ne estus eble fondi klubon?

J. A. B., Borås. Sinceran dankon pro via letero. Ĝis baldaŭa re-skribo!

A. Å-n, Köping. Esperante, ke vi plej baldaŭ resaniĝos, ni deziras al vi ĉian sukceson. Jen la kvaral!

A. J-n, Dala Husby. Ĉu ni baldaŭ aŭdos ion pri klubo?

E. F-n, Luleå. Sama demando!

HERRAR

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

Edvard Lindbloms

MATVARUAFFÄR

DROTTNINGGATAN 18 ☉ GEFLE

TELEFON 1611.

Order till landsorten expedieras omgående.

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Josef Wikströms

Tobakshandel

GEVALIAPALATSET

Restaurant Freja

A. T. 8148. - Tunnelgatan 19, Stockholm.

Fullständig Frukost-, Middags-

- - och Aftonservering. - -

Gott bord och billiga priser.

Öppet 8 f. m. 11,30 e. m.

FYRVÄPPLINGEN,

organ för Excelsiorförbundet och andra folk-kulturella rörelser, utkommer i Skara en gång i månaden och kostar endast 1 kr. för helt år.

Mot 60 öre i femöres frimärken erhålles tidningen (utom nr 1 och 2) i utgivarekorsband från exp., adress endast **Skara**.

Aktuella programpunkter äro folkhälsans främjande och djurskydd.

Esperantoavdelning, redigerad av den kände Esperantoentusiasten direktör G. H. Backman, Hälsingborg. F. n. pågår en lättfattlig Esperantokurs för nybörjare. Litterära pristävlingar. F. n. med ett bibliotek, värt 50 kr., som pris.

Fyrväpplingen är en tidning för ungdom och ungdomsvänner.

Vördsamt
Redaktionen.

Kiam vi bezonas
viandon, mendu

ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 ☐ GEFLE ☐ Telef. 34

Central- och Jernvågshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 1697.

PROVU LA KOPIOKRAJONON

ESPERANTO!

3:— kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

KOM IHÅG!!!

Hällströms Tobakshandel

BRYNÄSGATAN 21 - - GEFLE

TELEFON 1803

Kort Lärobok i Esperanto

för nybörjare av

ALBIN ZACHRISSON

Läroverksadjunkt, Karlstad.

Rekvireras pr kontant hos förf., Karlstad.

PRIS 75 ÖRE.



N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 700 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.

Argenta medalo en Stockholm 1897
, , Gefe 1901
, , Norrköping 1906

W. WAHLUND

Pappersvaror och skrivmateriel

RIKSTELEFON 1723 ■ GEFLE

Carl Larssons

FOTOGRAFIATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 357

Kafé Linnéa

(Nykterhetsvännernas Kafé)

NYGATAN 34 - (Pousettska huset)

■ TELEFON 859 ■

Frukostar, Middagar och Soupéer.
Smörgåsar, Kaffe, The o. Choklad m. m.
Beställningar för mindre sällskap.

LOVISA HÖRLIN.

La Espero

utgives av Gefle Esperanto-förening och utkommer i slutet av varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.

Prenumerationspris Kr.

1: 20.

Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, genom återförsäljare eller på posten.


Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

Redaktion och expedition:
3—23, Gefle.

Abonprezo ekster Svedujo
1:00 Spesmilo. (12 numeroj).

Specimeno kontraŭ respondkuponon. Mendo ĉe
R. Pehrsson, 3—23, Gefle.



Ozarowsky & Pehrssons Bleck- & Plåtslageri

■ REKOMMENDERAS ■

TELEFON 188